N-o 5.

# BULTENO

1937.
18. VII.

DE ESPERANTO-ASOCIO EN ĈSR.

Redakcio kaj administracio:
Praha XIX., Uralské nám. 447.
Telefono n-ro 718-41.

Redaktas:
ST. KAMARYT.

Senpage por membroj de
Esperanto-Asocio en ĈSR.
Aperas sesfoje dum la jaro.

# ANTAŬKONGRESO EN PRAHA

## Esperantistaj tagoj la 5.—6. aŭgusto 1937.

### Programo:

ĴAŬDE 5. VIII.:

Dum la tuta tago *akcepto,* tuj en la stacidomo, de la gastoj, kiuj anoncis la *horon* de sia alveno.

*Gvidado* tra la urbo, *vizito* de la vidindaĵoj de Praha.

Amika *vespera arango* kun iom da programo.
„Tra Ĉeĥoslovakio en 40 minutoj".

VENDREDE 6. VIII.:

Matene *kunveno* por honori la 50-jaran jubileon de Esperanto.
Fama oratoro esperantista estis petita paroli.

Tagmanĝo.

Vizito al la urbdomo, akcepto ĉe la urbestro de Praha.

Gvidado tra la urbo, ev. rondveturo per turista aŭtoĉaro (por eksterlandanoj ega rabato).

Vespere je la 23·03 *forveturo* komuna al Varsovio (alveno tie sabate je 12·48 horo).

* * *

*Adreso por korespondaĵoj:* Fr. Slavík, Praha 47, Uralské 9.

*Adreso de la oficejo de Asocio:* Praha XII., Fochova 9 (kvin minutoj de la Wilson-stacidomo.)

*Adreso de la kunvenejo:* Praha II., strato Národní, 20 (kafejo Louvre, I-a etaĝo).

**Alîĝo.** Anoncu vian alvenon per letero aŭ poŝtkarto. Skribu la tagon kaj horon de via alveno. Informu, ĉu vi deziras, ke ni prizorgu por vi hotelan ĉambron (unu-, du-litan).

**Kotizo.** Neniu kotizo estas postulata.

**Fervoja rabato.** Vi rajtas ricevi 25% rabaton sur ĉeĥoslovakaj fervojoj, eĉ se vi veturas sola. Sed vi bezonas specialan rabatilon, kiun ni sendos al vi kaj tiun vi prezentos aĉetante la bileton en la limstacio aŭ en via vojaĝoficejo. Informu nin, tra kiu limstacio vi eniros kaj eliros kaj almetu 4 respond-kuponojn (ĉeĥoslovakoj 10 Kč) por efektivaj elspezoj.

Estas konsilinde, ke vi aĉetu la bileton **nur ĝis Praha,** ĉar por la linio Praha-Varsovio ni aĉetos komunan bileton kun **rabato pli granda** (karavano de pli ol 50 personoj 33%-an rabaton, de pli ol 100 p. 50% en Ĉeĥoslovakio, kaj karavano de 60 p. en Polujo 50%).

Por ne prokrasti la aferon, vi povas skribi ĉion, kio koncernas la fervojan rabaton, senpere al Estro de nia Turisma Sekcio s-ro **Robert Bloch**, Praha-Smíchov 106.

---

# Praha - urbo de mondturistiko.

*(Dr. Aug. Pitlík.)*

Praha, ĉefurbo de Ĉeĥoslovaka respubliko, nomata pro sia situacio kaj historio „Romo de l'nordo", estas por fremdulo viva muzeo de arkitekturo.

Jam depost mezepoko Praha estis ofte vizitata de fremduloj, kiuj venadis ĉi tien parte pro politikaj motivoj, ĉar Praha estis dum certa tempo sidejo de romgermanaj imperiestroj, parte pro komerco kaj arto, kiuj ĉi tie floris. En intereso de scienco kaj arto la regnestroj ĉe sia kortego en Praha kunvenigadis eminentajn eksterlandajn scienculojn kaj komisiis fremdajn artistojn konstrui en Praha vicon da palacoj, kiuj ĝis hodiaŭ beligas la urbon. La universitato de Praha estas la plej malnova fonto de scienco en mezeŭropo, el kiu ĉerpis scion anoj de la plej diversaj nacioj.

Ne mire do, ke ne ekzistas kultura nacio, kies anoj ne estis vizitintaj Prahan kaj ne trovus tie postsignojn ankaŭ de sia nacia kulturo.

En la muzeo de Náprstek A m e r i k a n o trovas multe da objektoj, kiujn kun granda diligento kaj elspezoj en Usono kolektis Vojta Náprstek. A n g l o j enpensiĝas en la preĝejo de st. Tomo ĉe la tombo de sia verkistino Vestonia kaj D a n o ne forgesos certe viziti la tombon de fama dana astronomo Tycho de Brahe en preĝejo de Týn. F r a n c o j interesiĝas pri multaj konstruaĵoj, rilatantaj al imperiestro Karolo IV., kiu estis edukita ĉe franca kortego kaj kies patro reĝo Johano de Lucemburgo mortis por gloro de Francujo sur la batalejo apud Cressy. La katedralo de sankta Vito estis konstruita laŭ planoj de Mathieu d'Arras, kiu ankaŭ ĝian grandan parton mem konstruis. La muregojn ĉirkaŭ la Nova urbo de Praha, fondita de Karolo, konstruis en la XVIII-a jarcento francaj inĝenieroj. Panoramo de pontoj de Praha rememorigas Parizanon pri simila scenerio de 8 Seinaj pontoj kaj la observa turo sur monteto Petřín pri sia kvinoble pli granda pariza modelo turo de Eiffel. La bildoj de Rubens en galerioj de Praha vekos intereson de N e d e r l a n d a n o.

I t a l o j ankaŭ trovos en Praha multon, kio tuŝas ilian kulturon. Loĝioj de kelkaj preĝejoj, precipe „Casa sancta" en Loreto, reĝa kasteleto „Belvedere" kaj la tuta palaco de Waldstein rememorigas la arton de italaj majstroj. Veneciano interesiĝos pri la tiel nomata „Venezia de Praha". En proksima somerrestadejo Roztoky oni trovas vilaon de inĝeniero Hloucha, kiu tie provis elsorĉi el japana materialo j a p a n a n medion. Multe da memorindaĵoj en Praha allogos G e r m a n o j n, kies artistoj estis tre oftaj gastoj en Praha precipe dum regado de germanaj imperiestroj. La plej memorindaj konstruaĵoj „Ŝtona ponto" kaj katedralo de st. Vito estas verkoj de Švabó Petro Parlier, baziliko de st. Georgo de Sakso Werher. P o l o j en la katedralo vizitas maŭzoleon de reĝino Anna, devenanta el pola reĝa familio de Jagello. A ŭ s t r i a n o j admiras la palacon Clam-Gallas, verkon de Fischer el Erlach, kaj interesplene haltas antaŭ domoj, en kiuj Mozart kaj Beethoven loĝis en Praha. R u m a n o j n interesas bronza statuo de st. Georgo, fandita en la j. 1373 en Cluj kaj donacita de Karolo IV. al Praha.

Por R u s o j estas ankaŭ interesaĵoj en Praha: Kristala lustro, donaco de caro Nikolao, en iama rusa preĝejo de st. Nikolao, kie de la j. 1891 okazis rusaj diservoj kaj kies rekonstruon subtenis la caro per 3.000 rubloj. S u d s l a v o j vizitos monaĥejon Emaŭzy, kie dalmaciaj monaĥoj iame diservis, uzante malnovslavan lingvon. Multe da objektoj en Praha ekinteresos S v e d o j n, kies armeoj dum la 30-jara milito kelkfoje vizitis Prahan. Konatan batalon sur la Ŝtona ponto prezentas plastika bildo de fratoj Liebscher, troviĝanta en turista dioramo sur Petřín. En palaco de Waldstein estas kopioj de statuoj, kies originaloj, forveturigitaj Svedujon dum la invado, nun ornamas reĝajn svedajn palacojn. Ankaŭ S v i s o j trovos en Praha ion, rilatantan al ilia lando. Legendo pri kavaliro Horymír, kiu de roko de Vyšehrad sur ĉevalo Šemík desaltis kaj transnaĝis riveron Vltava, al ili reproduktos similan historion, okazintan laŭdire dum pratempo antaŭ la katedralo de Bern.

Per la diritaĵo ne estas elĉerpita la riĉeco de komuna homa kulturo, konservita en Praha, pri kio ĉiu vizitanto al Praha propraokule povas facile konvinkiĝi.

## Ĉeĥoslovakaj esperantistoj venu al Praha!

Ni ĉiuj kun ĝojo atendas la venon de la eksterlandaj gastoj al la tagoj de la Antaŭkongreso kaj ni ĉiuj klopodos fari ilian restadon en Praha agrabla.

Anoncas sian venon al la ĉefurbo ankaŭ samideanoj el diversaj lokoj de la respubliko, kiuj ŝatos saluti la fremdlandajn esperantistojn. Iuj ĉeĥoslovakoj kunveturos poste al la Universala Kongreso en Varsovio, la aliaj, malpli feliĉaj devos kontentiĝi pri la partopreno en la festaj tagoj de Praha. Por ili la Antaŭkongreso estos neofta okazo kunveni kun amikoj alilandaj.

Sed agrabla kaj utila estos ankaŭ la kunesto de ĉeĥoslovakaj esperantistoj el diversaj regionoj. Ili priparolos inter si kaj kun la gvidantoj de ili elektitaj siajn diversajn zorgojn kaj interkonsentiĝos pri plua laboro. Pli detale kaj pli bone ol estus iam eble eĉ per tre longaj leteroj.

Niajn amikojn eksterlandajn, sed ankaŭ niajn samlandanojn ni sincere invitas al la Antaŭkongreso de Praha.

**Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko.**

---

## Kongres-karavanoj.

Dum la lastaj Universalaj Kongresoj de Esperanto nia asocio aranĝas komunajn karavanojn por la partoprenantoj de la kongreso. Nia asocio zorgas ricevi rabatitajn vojaĝojn por la unuopuloj en- kaj eksterlandaj. Por ricevi fervojrabaton tra nia lando, oni devas posedi specialan legitimilon, kiun prizorgas nia ĝenerala sekretario R. Bloch, Praha—Smíchov 106, Č.S R. Ĝi kostas por samlandanoj Kč 10·— kaj por eksterlandanoj 4 respondkuponojn. Mendante la legitimilon, indiku la ambaŭ limstaciojn.

Ankaŭ la asocio zorgas pri senpagaj vizoj por ĉiuj kongresanoj, veturantaj tra nia lando. De multaj landoj oni ne plu bezonas ĉsl. vizon.

*Laŭ la dekreto* nro 162.944/V-4/36 de 19. XII. 1936 la ministerio de eksterlandaj aferoj en Praha rajtigis ĉsl. oficojn eksterlandajn donadi senpagajn vizojn por la kongres-partoprenantoj en Warszawa (7.—14. VIII. 1937).

*Laŭ la dekreto* n-ro 63.628-III/3-36 de 31. XII. 1936 de ministerio por fervojoj en Praha, ni sukcesukcesis ricevi 25%-an rabaton por samideanoj veturontaj al XXIX-a en Warszawa tien kaj reen. Rabaton oni ricevos kontraŭ la speciala legitimilo de la fervoja direkcio, se ni ĝustatempe ricevos nomaron de la partoprenantoj kun la difinita direkto (limstacioj) kaj klaso.

*Rob. Bloch,*
*(Turisma Sekcio de EAĈSR).*

## Internacia salono esperantista en Praha.

Tiun ĉi titolon certe meritas *Esperantista Klubo en Praha*. Ĝi, vere la plej malnova ĉeĥoslovaka Esperanto-klubo, estas ofta renkontejo de fremdlandaj esperantistoj, kiuj vizitas la ĉeĥoslovakan ĉefurbon.

Dum 35-jara daŭro de la Klubo trairis ĝiajn kunvenojn nekalkulebla nombro de gastoj el ĉiuj mondpartoj. Regulaj, ĉiuvendredaj kunvenoj de tiu ĉi klubo fariĝis pro tio tradiciaj. Jam de pli ol 25 jaroj okazas la kunvenoj ĉiam vendrede. Kunveno, kiun ne ĉeestus fremdlandaj gastoj, estas vera escepto. Oni eĉ ne kapablas prezenti al si tian kunvenon. Ĉiujare multaj centoj de fremdaj samideanoj vizitas la klubon kaj ĝiajn kunvenojn. Dum jaro pasinta apartenis la gastoj entute al 20 nacioj.

La membraro de tiu ĉi klubo aktive partoprenas en ĉiuj laboroj poresperantaj, kiuj okazas en Praha, aŭ kiuj estas direktataj de la landa asocio. Antaŭkongresa komitato 1937 konsistas preskaŭ plene el anoj de la Klubo. La kunvenoj de la antaŭkongreso okazos en la kunvenejo de la Klubo. Venu do, ŝatataj samideanoj, al Praha! Esperantista Klubo en Praha zorgas, ke vi travivu belan fabelon en centtura ora Praha, por ke vi ankoraŭ longdaŭre rememoradu pri ĝi kaj ĝiaj esperantistoj! Šustr.

---

## *Informoj.*

**Cseh-kurso en Trenč. Teplice** 15.—28. VIII. 1937. Instruos rumano Sig. Pragano ĉiutage de la 9-a ĝis 13-a horo. Post la tagmanĝo ekskurso, vespere amuza kaj societa programo. Kursa kotizo 40 Kč, loĝo kaj manĝo por la kursdaŭro 260 Kč. Kotizon kun antaŭpago de 40 Kč (per blankopagilo al la poŝtĉeka konto n-ro 3423 de Domov SSSU, Turč. Sv. Martin) akceptas Domov SSSU, Turč. Sv. Martin.

**Oficialaj poŝtkartoj ĉeĥoslovakaj kun esperanta teksto.** Laŭ propono de EAĈSR la ĉeĥoslovaka poŝta ministerio eldonis du poŝtkartojn kun esperanta teksto. Ili estas por ni speciale interesaj, ĉar ili — la unuaj en la mondo — koncernas la esperantan aferon. Unu portas la bildon de Brno kun teksto en lingvo ĉeĥa kaj en Esperanto: „Brno. Urbo de Verda stacio kun regula esperanta radiosendo.“ La alia montras Zamenhof-straton en la Esperanta Libertempejo Lázně Bělohrad kun la teksto: „Lázně Bělohrad. Aleo de dro L. L. Zamenhof“. — EAĈSR sendas senpage unu el tiuj ĉi poŝtkartoj al eksterlandaj esperantistoj, kiuj publikigos pri ĝi artikolon en nacilingva gazeto kaj alsendos tiun gazeton. Por du div. artikoloj estos donitaj ambaŭ poŝtkartoj.

---

## Loka kongresa komitato de 29. Universala jubilea kongreso de Esperanto en Varsovio.

*Honora Protektanto* de la Kongreso estas ŝtatprezidanto de Pola Respubliko s-ro prof. D-ro Ignacy Moscicki.

*Kongreso* okazos la 7—15 de aŭgusto 1937 en ĉefurbo de Polujo—Varsovio. *Vizoj* estas senpagaj.

*Fervoja rabato* en Polujo estas 33% tien kaj reen (grupoj 60 pers. 50%). Blinduloj kaj akompanantoj havas 50% rabaton. Fervoja rabato en Belgujo, Francujo kaj Ĉeĥoslovakujo. LKK klopodas pri plua rabato.

*Komunaj loĝejoj* kaj hoteloj estas malmultekostaj. Demandu prezojn.

*Manĝaĵo* en Polujo estas tre malmultekosta. Ekz. bona tagmanĝo 1—2 zl.

*Karavanoj* estas organizataj el 15 landoj. Pola vojaĝoficejo „Orbis", filioj kaj reprezentantoj en multaj landoj helpos aranĝi la vojaĝon.

*Oficiala gazeto* de la Kongreso estas „La Jubilea" senpage sendata al ĉiu Kongresano. Detalojn pri la Kongreso presigas „Heroldo", „Esperanto". *„Ora Libro"* de Esperanto — 240 paĝoj grandformataj senpage por Kongresano. *Programo* de la Kongreso antaŭvidas multajn interesajn aranĝojn. Ni notu: 1) Solenaĵon sur la tombo de l'Majstro, 2) Feston de Veteranoj, 3) Enmurigon de Zamenhofa memortabulo, 4) Teatron, dum kiu oni ludos esperantlingve „Consilium Facultatis" de A. Fredo — trad. A. Grabowski, ankaŭ estos baleto kaj koncerto, 5) Internacian Balon, 6) Esperantan Kabaredon, 7) Literaturan Vesperon, 8) Ekskurson al Bialystok, 9) Laborkunsidojn, 10) Fakajn kunsidojn kaj konferencojn, 11) Jubilean Ekspozicion, 12) Gvidadon tra la urbo, 13) Postkongresajn Ekskursojn k t. p.

*En la kadroj* de la Kongreso okazos Blindula Kongreso, Konferencoj de TEKA kaj TAGE, kies signaldiro estas „Esperanto en la lernejojn!"

*Dum la Kongreso aperos* granda ĉiutaga gazeto en Esperanto. *Multajn* avantaĝojn kaj plezurojn donos la Kongresa programo.

*Glumarkoj* kongresaj estas riceveblaj 50 pecoj nur por 2 respondkup.

*En Varsovio* centoj da policanoj, tramvojistoj kaj privataj personoj lernas Esperanton. Ili ĉiuj tre volonte helpos al la Kongresanoj.

Karaj Samideanoj en la tuta Mondo! Amase partoprenu nian Universalan Feston en Varsovio! Tuj legeble plenigu la aliĝilon kaj sendu ĝin al Loka Kongresa Komitato de Universala, Jubilea Kongreso de Esperanto, Varsovio, Al. Jerozolimskie 39/11.

Se Vin logas la progreso,
Tuj aliĝu al Kongreso.
Varsovio vokas Vin!

## Ni gratulas!

Al ges-oj Hans J a k o b en Genève okaze de ilia edziĝo.

Al la geedzoj D á v i d o v i č en Chust naskiĝis la 12. V. 37 filineto Elza.

---

## Ricevitaj libroj kaj gazetoj.

Librojn, ĉe kiuj estas notita prezo en Kč, liveros la Libroservo de EAĈSR afrankite por la notita sumo.

*Vilém Werner, Homoj sur flosglacio.* Komedio en tri aktoj. Trad. kaj eld. MEP, Olomouc. 112 paĝoj, 15x20 cm. Prezo Kč 12·80 kartone bind. La rapide famiĝinta teatraĵo de Werner prezentas bildon de nuna socio kies grava parto, la familio, dissolviĝas. La infanoj ne komprenas la patron nek la patro la infanojn. La lertaj MEP-anoj sciis denove trovi ĉeĥan verkon, kiu meritas esti internacie konata. La tradukintoj montris ĉiujn siajn kapablojn. La bele ekipita libro trovos certe multajn ŝatantojn.

*Niaj vizaĝoj* estas belaspekta nova gazeto eldonata en Jugoslavio. Ĉiu numero enhavas multajn ilustraĵojn. Ni deziras multan sukceson al la nova kolego. Abono 5 respondkup. ĉe Damjan Vahen, Ljubljana, Reslova 29.

*Kuressaare,* saniĝlima kaj mara kuracloko en Estonio invitas per plaĉa prospekto pasigi la someron en tiu vere vizitinda loko sur estona insulo. Postulu ĝin senpage laŭ adreso: Linnavaltsus, Kuressaares, Estonio.

**Parizo.** Familio akceptas pensionulojn. Speciala kaj rapida metodo lerni la francan lingvon. Komforta vilao 15 km de Parizo. — Skribu al s-ino Gernaey, 28, boulev. République, Chatou (S. & Oise).

**Somero ĉe la maro.** Plej agrabla moderna hotelo apudmara. Manĝo kaj loĝo 65—70 dinarojn potage. Skribu al Hotelo-pensiono Esperanto, Selce apud Crikvenica, Jugoslavio.

BICIKLISTOJN AL VARSOVIO
serĉas Karel Holeček, Josefov.

**Vizitu la ĉarman sudan Bohemion!**
Informoj ĉe Jos. Ploss, Skuherského 63
České Budějovice.

Tiun ĉi numeron redaktis kaj eldonis la Prepara Komitato de Antaŭkongreso Praha 1937.

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz esperantistů ČSR. v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík — Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. — Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933. - Podací úřad Praha 45.